

Prezo: 7 €

www.satesperanto.org

Julio-Aŭgusto 2017 | n-ro 07-08 (1345-1346)



Sennaciulo

OFICIALA ORGANO DE SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA



SAT-anoj kutimiĝu al eksternacia sent-, pens- kaj agadkapablo!

Pri Quenaud kaj Tardieu

Mi vidis, ke jam plurfoje aperis artikolojn pri Raymond Queneau. Jes li estis eksperimentista poeto sed li ankaŭ verkis poemojn, ni diru poeziajn! Pri emocioj de la sorĉaj momentoj de la vivo.

Ekzemplo esta tiu pri tiu momento kiam nokto estas finiĝanta, kaj matenruĝo proksimiĝas. Tiun poemon mi lernis parkere, kaj kutimis reciti al mi ĉiufoje kiam mi troviĝis ekstere veturanta ĉe tia horo!

Pli poste mi esperantigis ĝin, jen:

NOKTO


Refaldas ĝi kun zorgego la kovrilon,
kiun ĝi sternis ĝis l' kvar finoj horizontaj,
Ĝi ĝin rulas kun malrapid', kaj kun preciz',
Ke aperu l' tuko kaj bluecaj
Eroj malsekigontaj vojojn kaj densejojn.

Jen tiu maljuna virin' kun plenpak' da vestaĉoj,
Estas ŝi;
Ŝi atendas pri la buso de l' noktoviduloj.
Ŝi revenos, ŝi revenos, certas
Etendi sur la mond' fortikan kovrilon.

Jes ja poezio ŝanĝas la vivon, kiel diris Pierre Seghers "Mi taksas ĝin afero nepra al l' homo tiom, kiom la batadoj de l' koro". Mi povas certigi al vi, ke

1° poemoj estas farataj por esti parkerigitaj; poemoj, kiuj ne indas esti parkerigitaj, ankaŭ ne indas esti legitaj!

2° oni ĉiam devas miksi ĝin kun la vivo, kiam oni faras, tiu ĉi ricevas duoble pli da senco (eble tri! sed ni ne fiku la muŝojn!).



Jean Tardieu laŭ Serĝo Sir'

Kaj se temas pri "eksperimenta poezio", alia samtempulo – en tiu epoko kiam en la franca radioestablo estis iu "Sekcio de la Esploro", tiaĵoj ne plu ekzistas en la nuntempaj amaskomunikiloj! – kiu faris esplorivan poezion, estis Jean Tardieu. Mi esperantigis kelkajn pecojn de li, jen unu (kun danko al Serĝo Sir' pro kelkaj sugestoj):

LA DECA MOND-CIVITANO

Docentmaniere, precize, sekvoĉe, sed akordiĝeme

Tiun mondon logike ŝatas mi
Pro tiuj veroj, kiuj pravigas
Menskapablojn, kiuj konsistigas
La komprencon enkaŭpe de ni.

Ekzemplo: mi ŝatas ĉi spacon
En kiu la mondoj lokiĝas,
Objektoj kaj etaj kaj egaj,
Kaj ankaŭ mi amas disvolvon
De l' tempoj sinsekvaj en kiuj
Ĉi tiuj objektoj moviĝas,
Ĵus kiam fuĝante l' nenion
Nur danke al la form' kaj kolor'
Ili al vidanto videblas:
Verdaĵo ĉar vere ĝi verdas
Ruĝvino, ĉar nepre ĝi ruĝas,
Ĉielo, ĉar blue ĝi bluas
La likvoj ĉar ili fluidas,
Kontraste la stato senmova
Tre strange ecigas solidojn
Starantaj en staro senŝanĝa.

Nu, se en tiu mondo logika
La aferoj alimaniere,
Neniom malpli mi kontentiĝus.
Jes la movojn ĉiajn mi tre ŝatus,
Ĉar nenio tiam ŝanĝas lokon,
Kaj de spaco kaj de tempo ordon,
Ĉar nenio iras propran vojon,
Dum migrado okazanta antaŭ
Ol eliri la neekzistadon,
Kaj la aĵojn kiuj ŝanĝas ankaŭ
Kaj koloron kaj konduton.
Ruĝan vinon ĉar ĝi blankas,
La ĉielon, ĉar ĝi ruĝas,
Blankan neĝon, ĉar ĝi verdas,
La herbejojn, kiuj nigras,
La fiksaĵojn, moviĝantajn,
Kaj la solidajn fluaĵojn.

Mi ne postulemas, kiel eca
Ĉiu afero estus, kontentas
Mi, ja obeema civitano
En ĉi universo konsekvenca.

Jean Tardieu, la genia aŭtoro de "Sinjoro Sinjoro", kies elpensema kaj humura poezio tamen estis fakte ege malĝojiga kaj malespera, fakte plene nihilisma.

Karaj legantoj,

En ĉi-tiu numero vi trovos diversajn raportojn pri la ĉi-somera SAT-Kongreso en Gimpo apud Seulo. La unua SAT-kongreso en Azio estis ege entuziasmiga, kaj espereble parton de tiu entuziasmo vi sentos foliumante la numeron. Plie, vi jam povas plenigi la kunsenditan aliĝilon por la posta kongreso, okazonta en Kragujevac dum aŭgusto 2018.

Apud tiuj kuraĝigaj signoj tamen ne eblas prisilenti kelkajn zorgigajn malfacilaĵojn. La nuna numero ne nur ege malfruas, sed plie estas denove nur 28-paĝa. Same, ĝis nun anonciĝis nur 7 kandidatoj por la venonta Plenum-Komitato, kaj 4 por la Ĝeneralaj Konsilantoj de kategorio A, kiuj principe devus kovri ĉiujn mondregionoj, kie estas SAT-anoj.

Ĉiuj el ni havas, ekster SAT, aliajn okupojn privatajn, profesiajn, aŭ aktivulajn. Sed la bonorda funkciado de SAT dependas, je ĉiuj niveloj, unuavice de la iniciatemo de ĝiaj membroj.

Agrablan kaj pripensigan legadon deziras al vi
La Redaktoskipo

Venontaj limdatoj

Sennaciulo 11-12/2017 (1347-1348): 20a de novembro

Sennaciulo 1-2/2018 (1349-1350): 31a de decembro

Sennacieca Revuo 2018: 31a de decembro

Preseraro:

En la numero 1343-1344 (majo-junio) de Sennaciulo, la "Memorando de Monda Unio de la Virino por la internacia konkordo" estis tradukita de Germain Pirlot, kiel indikite en p.26, kaj ne de Mirejo Grosjean, kie indikite en p. 27.

Enhavo

Enhavo

RAPORTOJ PRI LA 90A SAT-KONGRESO

- 4 La 90-a SAT-KONGRESO LIBA GABALDA
- 5 Deklaracio de la 90a SAT-Kongreso
- 5 Gvidrezolucio de la 90a SAT-Kongreso
- 6 Raporto pri kongresaj laborkunsidoj
- 8 Kandidatoj por la Plenum-Komitato de SAT, mandatperiodo 2018-2021

TRA LA MONDO

- 9 Traktato pri la malpermeso de nukleaj armiloj
- 10 Notoj pri la monda kapitalismo MIYAZAWA NAOTO
- 12 La temo de la greka ŝuldo, denove... sed reviziita de greka sindikatisto!
- 14 Post la morto de Fidel Castro, kio? JOSE LUIS MONTES DE OCA
- 14 1-an de Majo 2017 en Havano VILHELMO LUTERMANO

SINDIKATISMO TUTMONDA

- 15 En tia epoko, pli ol iam ni bezonas LabourStart ERIC LEE
- 15 Alvoko RENATO CORSETTI
- 15 Intervjuo kun Eric Lee RENATO CORSETTI
- 16 Belorusio: Ĉesigu la atakojn kontraŭ la sindikataj gvidantoj

ENMIGRADO

- 17 Homgrupo-fobioj kaj civilizacio-koliziismo en SAT? Kiel tio okazas? GERI MIKLE
- 18 Politika propagando? JOSEF KROB
- 18 Reage KANI
- 19 Eĉ hundojn oni ne tiel traktas!

BELETRO

- 2 Pri Quenau kaj Tardieu ROLAND PLATTEAU
- 19 Recenzo PAOLA TOSATO
- 20 Invite al Kampo de Literaturo
- 20 Monaj ĉifonoj (4) ESPOPORE (EVGENIJ GEORGIEV)
- 21 Poeta rigardo al francaj koncentrejoj VINKO MARKOVO

HISTORIO

- 22 Kelkaj tre interesaj faktoj pri la nazia reĝimo ROLAND PLATTEAU

SAT-ANOJ AKTIVAS

- 23 E-kulturo en Hispanio ekster Esperantujo MIGUEL FERNÁNDEZ

EL LA SAT-ADMINISTREJO

- 22 Novaj aliĝoj
- 27 Kragujevac - la kongresurbo de SAT, 2018
- 26 Landaj Perantoj | Kotizoj | Praktikaj informoj

*Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem. Ricevitajn manuskriptojn ni ne resendas. Kontribuojn sendu al:
sennaciulo.redaktejo@gmail.com*